

ENHAVO

- | | |
|---|---------|
| ☛ Paroloj neniam rezultos troaj
<i>Alexis Otero Castellón</i> | 3 - 4 |
| ☛ Konservi historie valorajn esperantaĵojn | 5 |
| ☛ Trovita gravega dokumento
<i>Juan-Ramón Rodríguez Gómez</i> | 5 |
| ☛ Esperanto kiel esprimilo de Humanismo
<i>Juan Lázaro Besada Toledo</i> | 6 - 8 |
| ☛ Sancti Spíritus okazigis Nacian Renkontiĝon | 9 |
| ☛ Pecetoj | 10 |
| ☛ Havano vokas
<i>Maritza Gutiérrez González</i> | 11 |
| ☛ Ekde alia angulo
<i>Juan Ramón Rodríguez Gómez</i> | 12 - 15 |
| ☛ Ĉu eblas vojaĝi tra Kubo? Kial ne?
<i>Marta Alonso Gutiérrez</i> | 16 |

Estimataj:

NACIA ESTRARO

Je la fino de la jaro 1997, AVANCO
—Oficiala organo de Kuba Esperanto-
Asocio (KEA)— reaperas, kiel umbiliko
de la kuba E-Movado celante transdoni
al vi ĝeneralan bildon de nia lastatempa
kaj estonta agado.

Ĉi kaze, mi rekomendas:

- Paroloj neniam rezultos troaj;
- Esperanto kiel esprimilo de Humanis-
mo; kaj

En la proksima eldono, AVANCO
inkludos ĉion rilatan al 15a Komitat-
kunsido, kiu okazos de la 5a ĝis la 7a de
februaro, en la orienta urbo Bajamo.

Ĝis tiam, via redaktoro,

*Julián Hernández Angulo
Prez. Atentas plenumon de
ĉiuj taskoj kaj fakoj.

*Maritza Gutiérrez González
Ĝenerala Sekr. Kontrolas
internan agadon.

*Alberto Rodríguez Pineda
Financoj, k. administrado
de la Centra Oficejo.

*Héctor Jiménez Batista
Instruado k. ILEI-Sekcio.


*Juan Ramón Rodríguez Gómez
Intern. kaj Pub. Rilatoj,
Historio, Bibl. k. Libroservo.

Ĉefredaktoro de Universo.

*Pedro Fernández Rodríguez
Kulturo. Artaj k. klerigaj aranĝoj.

*Alexis Otero Castellón

Alexis Informado. Ĉefredaktoro de
Avanco kaj La Noktuo



Komisiitoj

*Martha Alonso Gutiérrez
Turisma agado

*Juan Lázaro Besada Toledo
Atento al verkistoj.

*Alberto García Fumero
Scienco kaj tekniko.

*Miguel A. González Alfonso
Membroj subtenantoj.

IX-a jaro, nro. 2 (3/97, sep.-dec.) / Aperas 3 foje jare / Eldonas: Kuba Esperanto-
Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 40-1364 kaj 40-4484 /
Fakso: 53 7 33 87 29 / Retadreso: kubesp@mail.infocom.etcsa.cu / Ĉefredaktoro:
Alexis Otero / Grafika aranĝo kaj kunredakto: Juan Ramón Rodríguez / Kunlaboris:
Juan Lázaro Besada, Maritza Gutiérrez kaj Roberto Molina / Prezo: 1:00 CUP (enl.),
2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj
rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).

PAROLOJ NENIAM REZULTOS TROAJ

Alexis Otero Castellón

Estiminda legantaro de AVANCO, plej koran saluton el la svisaj Alpoj. Kiel pluraj el vi scias, de antaŭ kelkaj monatoj mi ne estas en la insulo. Malgraŭ la distanco, mia koro kaj pensoj ĉiam prizorgas spacon por vi kaj ĝuste tial mi ŝatus prikomenti aferon kiu de vi ĉiuj konatas, sed pri kiu, miaopinle, paroloj neniam rezultos troaj.

Dum plej diversaj okazoj, nia kara Juliano, t.e., la nuna prezidanto de KEA, insistege pledis al ni ĉiuj pri la neceso ke nia lernantaro devas multe pli paroli E-on ol ĝin gramatikumi. Kaj tion li faris editfoplene ĉar ni pli ol spertas propraokule ke liaj grupanoj ja korekte esprimas sin en la lingvo de Zamenhof. Per tiuj enkondukaj paroloj mi neniel celas saŭsumi aŭ ankoraŭ pli elstarigi la pozicion, ĝuste gajnitan, kiun li ĝuas inter ni.

Mi celas vekti, ĉefe, la atenton de la instruanta opo, al la neceso aliri ĉiam novajn vojojn al pli konscia kaj aktiva metodaro, celonte pli rapidan kaj efikan esprimopovon de la kursanoj. Sen, kompreneble, preterlasi la certe ĉefan celon de la E. movado, adresata al plimultigo de niaj homfortoj, oni povas sukcesigi plej rapidan parolkapablon de la grupanoj demandante al si mem, por ekzemplo: se mi lernus novan lingvon, kion mi bezonas esprimi unualoke? Ĉu saluti, ĉu prezenti min kaj prezenti aliajn, ĉu diri la horon, ĉu...? Per tiaj demandaroj al si mem oni povas sekvi strategion, kaj je ties respondoj atingi metodon plej efikan, kiu signifas ke ni instruas per funkcioj kaj laŭ komunikaj metodoj.

Kiom multajn fojojn li (Julían) parolis pri la samo! kaj kiom multaj el ni aŭdis, aplaudis kaj poste daŭre instruis per tute aliaj metodoj, neinte eniron de plej aktiva kaj moderna maniero enkapigi novan lingvan kodon. Mi ne neas ke kelkaj el niaj instruistoj daŭre havas sukceson laborante per malnovstilaj metodoj, sed je la fino, ili alvenos al la konkludo ke oni nepre devas renoviĝi, se intencas daŭre resti en la hodiaŭa lingvo merkato, pli kaj pli supersutita de ĉiumonataj novaj kursoj, libroj kaj ĉiaj modernajoj.

El de miaj komfortegaj foteloj jen en Luzern, Aarau aŭ Zuriko, mi eble, ne rajtas kritiki tiujn insiste fidantajn je siaj sperto kaj pruvite efika metodo,

sed ili komprenu ke kun tia sinteno, oni daŭre neas la progreson de la instrua fako, kio poste, por ni, signifas perdon da tempo kaj energio ĉar tuta grupo el ajna nivelo ne plu ĉeestis la klasoĉambron, sen iu vere rimarkinda kialo, sed se poste oni rekte demandas iun el ili, facile konstateblas ke mankis al ili, ne deziroj aparteni al unika organizaĵo, sed esprimopotenco en la nova lingva kodo.

Oni konsciu, ke krome, ni, kubaj esperanto-instruantoj havas enorman malavantaĝon: Kapitalismo frapas niajn pordojn kaj la homoj, malgraŭ kulturtipaj intereso, amase lenigas la fremdlingvajn lernejojn... kaj li devas pagi po dudek pesoj monate ricevonte nenian servon, kion ja ĝuas nia anaro. Sed, kio okazas en tiuj lernejoj? Proprosperite, ĉar mi devis fulme ellerni la germanan por minimuma komunikiĝo, mi povas diri ke en kvarmonata studo de tiom ekstreme komplika lingvo, por ni, mi ricevis eble tri aŭ kvar gramatikajn regulojn nur... kion ni faris la ceteran tempon? plej simple: komunikiĝi nepre en la nova kodo kaj kion mi taksas plej taŭga, per diversaj komunikaj situacioj, ni devis ĉiutage solvi plurajn taskojn kiajn vendi, aĉeti, telefoni, direktori lernejon, peti, ktp., kc., ĉio en la nova lingvo kaj ne ĉiam per la libro. Ni devis aŭdi kantojn, kompreni la tekston kaj poste diskuti pri ĝia enhavo... en la nova lingvo. Mi demandas min ĉu ne eblas tion fari en E-o leciono ankaŭ? Mi certas ke jes, ĉar potencialon sufiĉan, homan kaj materialan ni posedas por tion atingi.

Eble jam pluraj protestetas ĉar temas pri du situacioj malsimilaj. Mi lernis pro simpla supervivcela neceso en tute alia lando kaj niaj esperantistoj pro kulturklera intereso, inter aliaj kialoj ne ĝuste por supervivi. Sed amikoj, je la fino ambaŭ estas lingvoj kaj kvankam la komparo ne perfektas, oni pruvigis al mi ke per tiuj modernaj manieroj instrui eblas atingi lingvan nivelon sufiĉan por ne malsatmorti kaj en relative mallonga tempo-periodo. Mi invitas niajn profesorojn, cerbumi pri tio, kaj lomete nur, alligi siajn metodojn en tiun direkton sed montrante al la grupanoj ke ili povas komunikiĝi, kaj ke ili ne lastas en la vico.

Kaj ankoraŭ, lastan rekomendon: en venontaj seminarioj, kongresoj aŭ alispecaj renkontiĝoj kie oni parolos pri Esperanto kaj oni aŭdos la kantojn de Juliano, ne kritiku ĉar kelkaj tekstoj ripetigas, sed pensu ke ankaŭ li aŭtoras tiun alian melodion pri enkonduko de leksiko, gramatiko kaj metodiko, nepre moderne kaj elstare didaktike tiel ke oni ne nur aŭdu sed ankaŭ lin AUSKULTU, se ni deziras daŭre subteni Esperanton viva, ene de la nova kaj iel sovaĝa lingvo-merkato, kiu tajdas ĉe niaj pordoj.

KONSERVI VALORAJN ESPERANTAĴOJN

KAMPANJO 2000 estas propono lanĉita de Universala Esperanto Asocio, cele al la Dua Jarmilo kaj ĝi devos tradukiĝi en konkretaj planoj.

La landaj E-organizaĵoj estis kunvokitaj al kolektiva agado kaj neŝflanke jam ekzistas konkretaj taskoj tiudirekte. Unu el tiuj farendaj taskoj sendube estas la bezono savi esperantaĵojn, kies celo estas eltrovi, prizorgi kaj konservi historie valorajn esperantaĵojn en bibliotekoj kaj muzeoj.

Kiel fari? Do, oni devas katalogi Esperanto-bibliotekojn en la koncernaj teritorioj eĉ la privatajn por almenaŭ lokalizi la esperantaĵojn, regule analizi la situacion de niaj bibliotekoj kaj konstante kampanji por konservi ilin.

En Kubo ekzistas, jam de pluraj jaroj, Komisiono pri Historio, kies tasko estas precize tia; tamen, malgraŭ plurfoja alvoko de nia respondeculo, nome Juan Ramón Rodríguez, malmultaj regule okupiĝas pri tio, aŭ se oni faras neniam informas.

Ni, tamen, scias ke multaj esperantistoj laŭlonge de la insulo posedas tre valorajn bibliotekojn personajn kaj objektojn tiajn. Do, ni alvokas ilin almenaŭ katalogi kaj informi pri tio kiel kontribuo al la tutmonda laboro sur tiu kampo, kunvokita de nia tegmenta internacia organizaĵo.

(El *La Noktuo* # 6 / 1997. 11. 11. p. 1.)

De la unua kuba E-propagandisto

TROVITA GRAVEGA DOKUMENTO

Juan Ramón Rodríguez

Post plurjara serĉado, finfine mi trovis "El Lenguaje Universal", gravega artikolo favora al Esperanto publikigita, en 1906, de Fernando Ortiz, elstara kuba intelektulo, nia unua E-propagandisto.

Pri tiu dokumento, delonge mi aŭdis kaj legis raportojn eĉ referaĵojn, sed neniam antaŭe ni vidis ĝin.

Krome, estis tre oportuna pro tio ke, la 10a de decembro, KEA okazigis, en la sidejo de la kuba Asocio de UNO, Simpozion pri Dro. Ortiz, kiun partoprenis elstaraj intelektuloj kie mi prelegis pri Fernando Ortiz kaj Esperanto.

Kune kun ĉi tiu numero de AVANCO, ni distribuas specialan eldonon de Universo pri la originala artikolo de Dro. Ortiz.

ESPERANTO KIEL ESPRIMILO DE HUMANISMO

Juan Lázaro Besada Toledo

Plurfoje mi sentas, ke al esperantistoj mankas iaspeca konscio pri la socia kaj ideologia roloj, kiuj nia lingvo ludas en ĉi tiu 20-a jarcento, jarcento skuata de militoj, rasismo, malamo, ideologia kaj ekonomia konkurencoj kaj bedaŭrinde - individualismo.

Kiam oni jetas eĉ la plej supraĵan rigardon sur la evoluon de humanismaj ideoj - kaj sendube el pluraj vidpunktoj Esperanto estas ideo tia - dum la daŭro de ĉi tiu jarcento, eblas konkludi ke oni ne facile trovas ideojn kies celo estu kunigi la homojn kaj plifaciligi la komunikadon kaj interkompreniĝadon en planedo ĉiutage minacata de detruado pro nia propra stulteco.

Ekde la Unua Mondmilito ĝis la hodiaŭaj tagoj, la homaro spertis terurajn minacojn al la homa digno en formo de plej hontindaj kaj abomenaj fiteorioj. Hitlerismo, ksenofobio, konsumismo kaj pluraj aliaj montriĝis en la praktiko kiom krime kaj kontraŭhome sovaĝaj ili estas. La nuna revivigo de faŝismo -en almenaŭ kelkaj landoj- estas signo de freneziĝo minacanta la tutan homaron.

Aliflanke, la senĉesa evoluo de scienco kaj tekniko danĝere forvoras la barojn al la rekta komunikado pere de parolataj lingvoj, ĉar la komputiloj kaj aliaj diversaj elektronikaj rimedoj igas la mondon multe pli facile konkerebla ol oni iam ajn estus povinta imagi.

Tamen, tiu nehaltigebla progresado de scienco kaj tekniko ne signifas ke la penso homa evoluis en la direkton de spirita progreso por plibonigo de la homaro. Ĉiupaŝe ni legas, aŭdas, kaj - kio estas ankoraŭ multe pli malbone - estas atestantoj kaj plurfoje kontraŭvolaj partoprenantoj de tiu terura izoliĝo de homo rilate al sia kunhomo. Regas materia progreso dum humanisma evoluo stagnas.

Konsumismo regas ĉie, senmezura amo al mono kaj socia bonfarto, esprimiĝanta pere de havaĵoj. Ĉio alia, t.e. la spiritaj kaj intelektaj valoroj, devenis sen signifa, forĵetenda balasto, kvazaŭ ĉiuj idealoj pri noblanimeco neniam ekzistintus "demandi la aŭtoron". La homoj sovaĝiĝis ĝis tia grado, ke plurfoje kaj plurloke regas sentoj brutalaj, kiaj rasismo kaj ksenofobio.

Ĉiuj kulturaj valoroj iom post iom degeneras. Kaj ne nur estas kulturaj valoroj en arto. Edukiteco, vestaĵoj, parolmanieroj, lingvouzo kaj aliaj estas ne malpli atentindaj facetoj de la homa kulturo. Saĝas, ke nur gravas la piezuroj de la sensoj kaj la korpo, kvazaŭ la anima, spirita kaj intelekta sanoj estus simplaj neglektendaĵoj. Kaj nun mi venas al la

ĉefa motivo de ĉi tiu artikolo: kiun rolon ludas Esperanto en ĉi tiu mondo ĉiutage pli kaj pli freneziga?

Laŭ mia vidpunkto, Esperanto estas lingvo kaj kiel lingvo ĝi povas utili tutsimple por komunikado, por interŝanĝado de pensoj kaj sentoj. Tamen, nia lingvo ekde la unuaj momentoj de ĝia ekzistado havis - kaj plue havas - trajton kiu distingas ĝin disde la ceteraj lingvoj. Kaj tiu trajto estas la esenco de esperantismo. Kiel filozofio, la esperantismo estas socia teorio absolute nova, tamen tre bezonata kaj hela formo de humanismo, ĉar ĝi pledas ne nur por flegado de la lingva interkompreniĝo, sed ankaŭ de la kora, spirita interkompreniĝo surbaze de reciprokaj respekto kaj toleremo. Se sincere dirite, la esperantismo estas ne nur kulturo de la parolo, sed ankaŭ kulturo de la homeco por aliro al la ebla solvado de tiuj lingva kaj spirita vojkruiciĝoj kiujn ni ĉiuj alfrontas.

La nuntempa mondo, la tuta homaro, bezonas konscii pri tiu problemaro minacanta la spiritan vivon. Kaj pere de esperantismo, kvankam tio povus strange ŝajni, miloj kaj miloj da homoj ĝuas unikan liberecon, interkompreniĝon kaj realiĝon de homeco. Vivi signifas, antaŭ ĉio, longan vojaĝon al perfektigado de la spirito, de tiuj homaj valoroj kiujn ĉiuj posedas kaj malmulte flegas.

Des pli bezonata estas nia konceptado kaj kultivado de esperantismo, ju pli ni komprenas ke ne sufiĉas la materiaj posedaĵoj por esti feliĉaj, noblaj, dignaj homoj. Kiu ne scias ame rilati al siaj kunhomoj, kompreni ilin kaj komprenigi sin, transdoni ĉion bonan kion li posedas kaj esti preta akcepti per malfermita koro kaj larĝa spirito ĉion bonan kion la aliuloj donas, tiu neniel povas ĝui homecon. Por tiuj homoj kies spiritoj enfermiĝas en turon de egoismo ĉiutage pli kaj pli, la valoroj de humanismo kaj noblaj ideoj; la valoro de esperantismo esta nur ridindaĵoj kaj utopioj.

La konceptado de Esperanto kiel socia teorio ne estas eraro; kio ja estas enorma eraro estas ignori ĝin kaj la komunumon kiu ekzistas danke al la lingvo. Kaj tiu komunumo estas socie enradikiĝinta en la moderna vivo kaj rajtas vivi en paco kaj sincera kunlaborado kun ĉiuj.

La esperantistoj apartenas - feliĉe mi asertas tion - al la kultivantoj de tute nova humanismo, de sincera filozofio tuŝanta la esencan homecon kiun ĉiu portas en si mem.

Postuli de la homoj ke ĉiu ajn rilatiĝu al la ceteraj kiel egaluloj, sen malamo, sen antaŭjuĝoj, per malfermita koro, estas malfermi la vojon al homaro pli feliĉa kaj nobla, ĉar nur tiu kiu pretas kompreni, eĉ se tiu ne samopinias, povas ĝui la vivon.

La parolantoj de Esperanto ĉie tra la mondo sentas sin plurrilate ligitaj. Ili scias, ke ilia aparteno al ideologio esence humanisma, esence frateca,

vicigas ilin en tute aparta socla kategorio. Tamen, ili ĝuas tiun propravole elektitan apartenon kaj ame flegas ĝin.

Kiu spertis la belegan rilatadon kaj amikecon atingeblan pere de nia lingvo, tiu ja scias kion povas donaci Esperanto por pliriĉigo de la homa spirito. Ni estas unika rondo, niaj idealoj - kies radikoj kuŝas en la plej homamaj ideoj - interfratigas nin kaj - margene de diversaj kvereloj kiuj estiĝas pro la diverseco de la homa naturo - ĝenerale ni scias atingi plej sinceran rilatadon al kiu ajn homo.

Esperantismo estas nova humanismo, sed profunde homama. Humanismo kiu enradikiĝas en la koro kaj plibeligas, plinobligas nin. Ĝi estas ne nur teorio pri la solvo de la monda lingvoproblemo, sed ankaŭ taŭga ilo pro alproksimigo de homaj spiritoj.

Ekzistas kulturo de la parolo, kulturo de la komunikado. Spite ĉiujn antaŭjuĝojn, nia lingvo jam de pli ol cent jaroj pruvis, ke ĝi povas solvi tiun komunikproblemon ne nur el lingva, sed ankaŭ el spirita vidpunkto.

Ĝuste tial la esperantistoj estas avangarduloj de nova socia kaj lingva komunikordo, ĉar ili proponas ne nur la solvon de lingva interkompreniĝo sed ankaŭ de homa, kora interkompreniĝo por paca solvado de konfliktoj kiuj nuntempe solviĝas pere de armiloj.

Ni ne mortigas homojn por solvado de konfliktoj; niaj armiloj estas rezonado, homamo kaj reciproka kompreniĝado. Ni strebas konstruadi - sur libero kaj paco - mondon pli belan kaj pli noblan por la homaro.

Tiel nia lingvo kaj nia movado konsistigas tute novan humanismon, kies esenco iĝas nin fieri pri la atingo de spiritaj libereco kaj paco, konstruitaj surbaze de la plej noblaj kaj longedaŭraj idealoj, tiuj kiuj eĉ ne armiloj kaj kontraŭhomaj pensoj povas detrui.

Ĉiam tra la longa historio de la homaro oni mokis la revoluciulojn pro iliaj avangardaj pensoj. Profetoj kaj geniuloj estis ĉercobjektoj de la ignorantaj homamasoj. Tamen, tiuj homamasoj restas eterne dankaj al tiuj kiuj ĉion foroferis por la plibonigo de la tuta homaro.

Nia celo, plej nobla kaj sekvinda modelo de humanismo, estos iam la eterna torĉo kiu lumigos la mondan interkompreniĝon, ĉar se idealisma, nia humanismo estas amoplena kaj realigebla en la praktiko. Ĝi estas vere internacia humanismo. Nin nek izoligos nek dispecigos militojn. Super ĉiuj eblaj katastrofoj ni jam fariĝis la avangardo de tiu estonteco pri kiu parolis kaj revis la profetoj.

Kaj ĉiu E-parolanto, ĉiu praktikanto kaj fleganto de esperantismo estas heroldo de tiu humanismo kies kvintesenco akompanis kaj ĉiam akompanos la noblajn aspirojn de la homa koro.

SANCTI SPIRITUS OKAZIGIS NACIAN RENKONTIĜON

De la 26a ĝis la 28a de septembro, laŭ interkonsento de la lasta komitatkunsido Sancti Spiritus okazigis Nacian Renkontiĝon. Kvardek kvar esperantistoj el 10 provincoj partoprenis.

Ni restadis en tre bela kampadejo, situanta en la enirvojo al la montoĝeno Escambray. La loko ĉirkaŭata de montoj havas imponan belecon.

Ĉe la naĝejo ni aranĝis kelkajn aktivecojn, deklamadon kaj dancadon.

Menciindas la elstara laboro de Julián Hernández Angulo, kiu prelegis kaj alparolis la publikon pri la Kampanjo 2000; kaj, akompanante sin gitare kantis tre belajn kanzonojn el sia abunda repertuaro.

Norberto Diaz Guevara prelegis pri la revuo Jajabo kaj ĉiĉeronis en promonado tra la urbo. La nacia komisiito pri turismo, Marta Alonso, kunsidis kun la reprezentantoj de la diversaj provincoj rilate al nacia kaj internacia Esperanta Turismo. Ankaŭ estis konkurseto pri konoj de Esperanto gvidata de Sinjoro Pedro Fernández, premioj abundis.

Kiel iniciato en tiu ĉi aktiveco la virinoj elektis el inter la viroj la kavaliron de l' evento, kiu estis la sinjoro Raúl Sánchez Guilarte, el Guantánamo; kaj la viroj siavice voĉdonis por la sinjorino Cristina López Díaz kiel la Stelulino de l' evento. Ni esperas, ke tiu ĉi iniciato daŭrigos en venontaj naciaj renkontiĝoj.

Ni elkore gratulas sinjoron Norberto Díaz Guevara kaj lian teamon, kiuj ĝis detale pretigis ĉiujn erojn de la programo.

Antaŭ kaj post la evento ni restis en la hejmo de Norberto, ni dankas ilin ĉar tre ĝentile gastigis nin.

Ni konsideras tiujn ĉi eventojn tre gravaj por la evoluo de Esperanto enlande kaj ni esperas ke dum la proksima jaro la naciaj renkontiĝoj estos tiel bonaj kiel tiuj de tiu ĉi jaro.

(El *La Noktuo* # 5 / 1997. 09. 30, p. 2.)

PECETOJ

Ni multe ĝojas pro la fakto ke, dum la nuna jaro, entuziasme la movado kreskis per nova kolektivo en provinco Cienfuegos, centro-sude de nia lando. Ili eĉ jam elektis gvidantaron kaj okazigis sian unuan kunsidon por plani la laboron. Ni firme esperas ke ili plu restu aktivaj kaj dankas speciale al la profesoroj José Luis Montes de Oca kaj Norberto Díaz, pro la farita laboro en tiu regiono. Subtenindas la juna movado en Cienfuegos!

La informa laboro en provinco Granma estas atentata far la filio pere de provinca radioprogramo Sintonía. Ili diskonigas pri Eo kaj la kuba movado kaj nuntempe disaŭdigas E-kurson kiel komplementon de la perkoresponda kurso. Jen (...) gratulo por la grupo kiu entuziasme preparas sin akcepti la 15an Komitatkunsidon de KEA en februaro '98.

Ankaŭ provinca filio de Santiago de Cuba meritas gratulojn pro la dujara datreveno de E-programo en la provinca radiostacio. Ja konstante samideano Gonzalo Collantes okupiĝas pri tiu fako kiu aparte kreiĝis por komplementi la perkorespondan kurson en la provinco. Ili omaĝas la datrevenon per radio-konkurso. Sukcesojn!

La nova sidejo de Esperanto en la municipo Centro Havano, de nia ĉefurbo, meritas grave roli en la provinco. Tiucele, jam efektiviĝas merkredaj «verdaj» renkontiĝoj forte impulsataj de nia prezidanto, Julián Hernández, kaj pluraj samideanoj regule partoprenas. Oni tuŝas movadajn kaj gramatikajn temojn en trankvila kaj kleriga etoso. Bonvenindas iniciatoj!

Antaŭen estas la nomo de la oficiala bulteno de la movado en provinca filio Camagüey. Ni jam tralegis la duan numeron de la informilo, kies celo estas pliklerigi la esperantistojn kaj diskonigi la provincan laboron. Interesitoj povas skribi al: pf. 5238, Camagüey 2, CU-70200 CUBA. Direndas ke Camagüey estas unu el la plej aktivaj E-filioj kaj la teamon kapas Jorge Luis González Santillán kaj Edilberto Rodríguez Acán.

(El *La Noktuo* # 6 / 1997. 11. 11, p 1.)

Havano vokas

HORO UTC	M	KHZ	REGIONO
7.00	31	9820	Okcidenta, Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
15.00	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
19.30	21	13715	Eŭropo kaj Mediteraneo
22.00	21	13715	Eŭropo kaj Mediteraneo
23.30	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
	49	6070	

Ĉi septembre, la E-redakcio fariĝos 10-jara kaj tiusence ni bonvenigas amikajn mesaĝojn kiuj certe kontribuos al nia laboro. Al ĉiuj samideanoj bondeziras en la nova jaro kaj petas al nia samkontinentaj aŭskultantoj pli kaj pli sendi siajn korespondaĵojn kaj informilojn.

Dankon al ĉiuj radioamantoj kaj al amiko Bruno Masala kaj AERA, kiuj konstante laboras per diversaj iniciatoj, instigante la esperantistojn skribi kaj subteni la E-fakon en Radio Havano.

Marliza Gutiérrez González
RHK-Redaktorino

Ok jara indekso de AVANCO

EKDE ALIA ANGULO

Juan Ramón Rodríguez Gómez

AVANCO fariĝis ok jara pasinjunie kaj ĝin ni resumis, per ĝenerala indekso, en la numero 2/97 (majo-aŭgusto); tie, ni promesis prezenti tiun laboron ankaŭ laŭ aŭtoroj kaj tion ni faras hodiaŭ.

Celante ne longigi ĉi tiun resumon, ni sekvas la jenan kodon: I (jaro 1a, n-ro 1, 16an de junio 1989), II (no. 1/1990), III (nro. 2/1990, 1an de junio), IV (nro. 3/90, 30an de decembro), V (nro. 1/91, 4an de novembro), VI (nro. 2/91, 31an de decembro), VII (nroj. 1-4/92, 31an de decembro), VIII (nro. 1/93, 29an de oktobro), IX (nroj. 1-4/94, 15an de decembro), X (nro. 1/95, 31an de majo), XI (Vila jaro, nro. 2/95, junio-decembro), XII (Vila jaro, nro. 3 -1/96-, januaro-aprilo), XIII (Vila jaro, nro. 1 -2/96-, majo-aŭgusto), XIV (Vila jaro, nro. 2 -3/96-, septembro-decembro), XV (Vila jaro, nro. 3 -1/97-, januaro-aprilo). Al tiuj numeroj, ni nur aldonos la paĝojn kie aperis ĉiu informo:

- **Akademio de Esperanto:**
Oficialaj informoj de la Akademio de E-o (II, 14-[16]).
- **Besada, Juan Lázaro**
Kial homoj kabeigas? (X, 8-9), Alvoko al arta kreado (XII, [5]).
- **Blanke, Detlev**
Kiel organizi sciencan esploron pri E-o? (I, 15-19).
- **Boulton, Marjoŝe**
Faktoj kaj fantazioj (fragmentoj) (VI, 7-8)
- **Brozovsky, Joel**
Estas facile kuiri per suno! (La radetoj) (VIII, 13-14).
- **Cardoso, Onelio Jorge**
Tosto por Zonzo (tradukis Maritza Gutiérrez) (I, 11-14).
- **Castro, Martín**
KEA jam kvarfoje en Expolingua (X, 13-14).
- **Duc, Michel**
La problemo de la normo en Esperanto (V, 5-9)
- **Díaz, Norberto**
S/T (letero al... *La legantoj skribas*) (VI, 4), S/T (el *Jajabo*) (X, 15), Agu, ne

- ploru! (pri *Kial homoj kabeigas?*) (XII, 7).
- **Fernández-Calienes, Alberto**
22a Konsultigo de SLEAJ (I, 6), Kongresa paĝo (II, 11-12).
 - **Franklin, Benjamin**
La virtoj de Benjamin Franklin (tradukis Orlando Raola) (VIII, 4 kaj 8).
 - **Guillén, Nicolás**
Havas mi (tradukis Orlando Raola) (III, 4)
 - **Gutiérrez, Maritza**
Alpasen! (I, [1]), Ni jubilas! (I, 3-4), Inaŭgurita Internacia Esperanto-Centro (I, 5), Infloresko (II, 3), Librofoire en Havano (II, 10), Veroj kaj esperoj (III, 3), Komunikcela esperantistigo: ĉu motivaro? (VI, 5-6), Diversloke (VII, 7), Strategio kaj realoj: informa fako (VII, 9), Kun vojaĝema samlandano (ĉe *La radetoj*) (VII, 15-16), Kelkaj konsideroj pri versa tradukado (ĉe *Kultura Panoramo*) (VIII, 5-6), Havano vokas (IX, 5), El la zamenhofa trezorujo (ĉe *Kultura Panoramo*) (IX, 6-7), El la Seula Kongreso (IX, 15), El katakomba flustro kaj venĝa historio (ĉe *Kultura Panoramo*) (X, 5-7), Camagüey: Prioritat-fonto (X, 13), Instigo al leterumado (ĉe *Havano vokas*) (XI, 6), Preparkomitato sin prezentas (2a Nacia Kongreso) (XI, [16]), Havano vokas (XII, 6), Kelkaj konsideroj (pri tradukarto) (XIV, 8-9), Havano vokas (XIV, 15), Komitatanoj kunsidis en Guantánamo (XV, 3), Komitataj decidoj (XV, [16]).
 - **[Gutiérrez, Maritza]**
Havano vokas... E-elsendoj de RHK (II, [13]), Havano vokas (III, 10), Havano vokas (IV, 10), Havano vokas (V, 10), Havano vokas (VI, 8), Havano vokas... (VII, 6), Kvin jarojn persisteme en la etero» (ĉe *Havano vokas*) (VIII, 9).
 - **Gutiérrez, Maritza kaj Orlando Raola**
Radio Havano Kubo (I, 8).
 - **Hernández, Julián**
Tri neaj respondoj (rilate al *Kial homoj kabeigas?*) (X, 9), Du KEA-anoj en Finnlando (XI, 3-4), Ni ne rajtas silenti! (XII, 3-[4]), Antaŭenigi la movadon (XIII, 3-6), Intensaj tagoj de niaj reprezentintoj (XIII, 10-12).
 - **Jiménez, Héctor**
Alvoko al Esperanto-instruistoj (VI, 4), Ĉu revo aŭ realo (IX, 8-9), Alvoko al Esperanto-instruistoj (IX, 10-11), Bunta kaj utila, laŭ ĉies opinioj (XIII, 7).
 - **Juárez, Raúl**
Memlerninto memoras... (VIII, 11-12)

- **Kuba Esperanto-Asocio**
Konkurso «Deka datreveno» (I, 6), Konkurso «Esperanto: centjara kulturo» (V, 11), El la laborstrategio de KEA por la periodo 1991-1993 (V, 16), Unua Bulteno (Dua Nacia Kongreso) (IX, [16]), Dua Bulteno (2a Nacia Kongreso) (X, [16]), Invito al 14-a Tutmonda Festivalo de Junularo (XIV, 6), Aliĝilo (SAEST'97) (XIV, 16), Estrara Raporto (XV, 4-14), Ĉefaj taskoj de KEA por 1997 (XV, 14-15).
- **Meier, Detlev**
Utiligo de Esperanto (VIII, 15).
- **Montes de Oca, José Luis**
Santo Domingo aktivas (XIV, 14).
- **Morales, Gustavo**
Katolika Esperanto-Rondo (ĉe *Kultura panoramo*) (VIII, 8).
- **Orellana, Atilio**
Ameriko kongresis en Kostariko (XII, 10-11)
- **Otero, Alexis**
Se temas pri junuloj... faktoj, ne plu fantazioj (II, 12), Definitive FAKTOJ, sed ... (III, 13), Analizante la 46an IJK... (IV, 14-15), Inciato plenigas vakuon (V, 13), Lasu la lingvon aŭdiĝi (VII, 8), Ni semas kaj semas (VII, 15-15), Plejparte novaĵoj! (VIII, 10), KUUK... Solidareco, obstine antaŭen! (VIII, 16), Ni rigardas antaŭen (IX, 3-4) Ni iras al Camagüey (IX, 11), Faktoj skribiĝas majuskle (IX, 12-13), Alia vizito de la Pastroj (IX, 14-15), Sukcesa evento Sciencteknika (X, 3-4), Steluloj nepre brilas, Kvakerino ĉe ni (XI, 7), Por ke Esperanto restu viva (XI, 7), Por plia profesieco (XI, 8-9), Datreveno tra la kajmano (XI, 9), Sukcesoplenaj (2a Nacia Kongreso k. 13a Komitatkunsido) (XII, 8-9), KEA organizos la 5an Nacian Seminarion (XII, 2), Denove du kubanoj en UK (XII, 12), Sukcesojn, centra regiono! (XII, 12), Librofoiro mallonge (XII, 12), Al kiu grupo vi apartenas? (XIV, 3-5),
- **[Otero, Alexis]**
Digna reprezentiĝo (Pedagogio '95) (X, 14), Iom for de la ĉefurbo (X, 14), S/T (pri 16a datreveno de KEA) (X, 15), S/T (Nacia Seminario por instruistoj) (X, 15), Niaj du delegitoj al Tampereco (X, 15), KEA komitatkunsidos en Guantánamo (XIV, 7), Survoje al SAEST'97 (XIV, 7), Se vi pretas pruvi vian verk-kapablon... (XIV, 7)
- **Piñera, Andrés**
Fonetikaj probl. de la kubaj Esperanto-parolantoj (V, 14-15)
- **Privat, Edmond**
S/T (frazo) (III, 15)

● **Raola, Orlando**

Quivicán, se temi pri avangardo (II, 4), (II, 7-9): Ne konvinki la konvinkitojn, sed plikonsciigi ilin. Trafolumante Monato-n, El «Kulturo kaj IL» de W. Auld, kaj Lernu Esperanton!; *Ĉe Kultura panoramo* (III, 5-7): Ni okupiĝas pri E-Kulturo... pri kio do?, Ekkonu la revuon Latinamerika Memuaro, El «Kulturo kaj IL» de W. Auld, kaj Subtileco de la vortordo, Mateniĝo post la verda tajdo (IV, 3-4), *Ĉe Kultura panoramo* (IV, 11-13): En la duan jarcenton movade kaj kulture, kaj Fragmento el «La E. Literaturo: Fenomeno unika» de Giorgio Silfer; Por vekaj eĥojn kaj partoprenon (V, 3), La radetoj (V, 1), Spite la ventojn... (VI, 1 kaj 3), Venke, bonpaŝe kaj malkrokodile (VII, 3-5), *Ĉe Kultura panoramo* (VII, 10-14): La lasta deklaro de la esperantistoj, kaj Kolokvo «La stato kaj estonteco de la lingvo Esperanto»; Por ne plu sklavi en cenoj de l' muteco... (VIII, 3-4);

● **[Raola, Orlando]**

Ĉe Kultura panoramo (VII, 5-8): Recenzo malofita

● **[Redakto-stabo]**

Lingve (I, 9-10), Deziras korespondi (I, 20), Avanc konkurso (II, 6), Kontaktojn serĉas (III, 16), Avanc konkurso (IV, 15), Ni salutas la 2an Kuban E-Festivalon (V, 12) Avanc konkurso (V, 15), Al Kubo tuttempe! (VII, 5), Deziras korespondi (XII, 16).

● **Rodríguez, Carlos Rafael**

Malferma parolado de la 75a UK (traduko: O. Raola) (IV, 5-9)

● **Rodríguez, Juan Ramón**

Unua Esperanto-Festivalo (I, 5), *Ĉe Jen Nia Historio*: Kvin tiklaj jaroj (X, 10-12), Rigardo tra kvar jardekoj (XI, 10-15), De KEA al KEA (XII, 13-15), Sukcesoplena epoko (XIII, 13-16), kaj Antaŭen, malgraŭ cio (XIV, 10-13).

● **Rodríguez, Manuel**

Ĉu instruisto aŭ edukisto? (pri *Kial homoj kabeigiĝas*), (XI, 5).

● **S/A**

Ĉe sidejo de trobadoroj (I, 5), 74a UK en Brajtono (I, 5), Fotoekspozicio (I, 6), Esperanto en radio (I, 7), Regionaj kongresoj (I, 7), Eĥoj el Bajamo (I, 7), Biografio de la alta protektanto por la 75a UK (II, 5-6), Havano Kongrese (III, 8-9), Profitu, libroservo antendas viajn mendojn (III, 11-12), Landa gazetaro: Ni, vi, la aliaj... ĉiuj! (VII, 7),

● **SUNIDO**

Krucenigmo (III, 14-15),

● **Universala E-Asocio**

Kongresa Rezolucio (75a UK) (IV, 6), Manifesto de Prago (XIII, 8-9)

ĈU EBLAS VOJAĜI TRA KUBO?

KIAL NE?

Marta Alonso

Ni, la kubaj esperantistoj, atendos vin, gastigos vin, kaj ĝuos ke vi estos inter ni.

Informu vin pere de niaj:

-Telefonnumeroj: + 53 7 404484, 401364 kaj 338729.

-Fakso: + 53 7. 33 87 29.

-Retpoŝto: kubesp@mail.infocom.etecsa.cu

Prezoj po persono (loĝejo kaj duonpensio, ĉiutage):

-En hejmo de kubaj esperantistoj 20.00 USD

-En hoteloj, ni havas du sezonojn:

Alta turisma sezono

*Du lita ĉambro 32.00 USD

*Unu lita ĉambro 42.00 USD

Malalta turisma sezono

*Du lita ĉambro 28.00 USD

*Unu lita ĉambro 38.00 USD

Sur loko vi havos la ŝancon elekti kien iri.

Ciferecigis: Javier Ramos @Radioamatoro